
AGEI-CIRKULERO julio-decembro 2006 (n-ro 12)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

I: AGEI a) historio

- b) membroj
- c) membriĝo
- d) subteno
- e) kunvenoj
- f) AGEI kaj ILEI
- g) informado

II. GEC/ICH

- a) filio de GEA
- b) programoj en 2007

III. Ekzamenoj

IV. Bondeziroj

I. a)

Ĉirkaŭ 20 000 infanoj en Germanujo lernas Esperanton. Ili estas instruataj de 630 instruistoj.

5429 infanoj en Jugoslavio lernas Esperanton en 171 lernejoj.

La unua informo estas el la jaro 1922 kaj la duan ni datigu por la lerneja jaro 1959/60. (Citaĵo el la parolado de Helmut Sonnabend okaze de la 18a konferenco de ILEI, IPR 1984.3)

Antaŭ 20 jaroj la 9an de decembro Helmut Sonnabend (1924-1986) definitive forlasis nin. Estos tasko de historiistoj pritaksi la signifon de Helmut Sonnabend en la historio de la esperantista pedagoga movado, skribis Dr. Istvan Szerdahelyi (IPR 1987.1.)

Kaj estas tasko por ni ĉiuj daŭrigi la laboron: instrui Esperanton, multobligi la nombron de E-parolantoj. La rolo de E-instruantoj, instruistoj estas tre grava: se ni ne aktivus, de kiu ni atendas rezultojn, novajn E-parolantojn, novajn membrojn por asocioj, ktp?

Kiom da infanoj nun lernas Esperanton en Germanio? Kiom da instruistoj instruas la lingvon nun?

Ĉu vi estas kontenta? Kion vi faras?

b) MALNOVAJ MEMBROJ: Bv. ne forgesi pagi vian AGEI-membrokotizon por 2007! AGEI-membroj povas multe helpi la novfonditan asocion (jure enskribita en julio 2006).

Konto 40 66 22 – 507 Postbank Köln BLZ 370 100 50

Se via adreso ŝanĝiĝis, bv. informi min, ĉar vi ne povos ricevi IPR (la fakgazeton de ILEI), kiu estas aŭtomate sendita al ĉiuj membroj de AGEI.

Peto al vi: se inter viaj konatuloj, en via ĉirkaŭaĵo estas E-instruantoj, interesiĝantoj pri instruado, subtenantoj de disvastigo de la lingvo, bv. rekomendi al ili membriĝi.

Kotizo: 25 EUR, por paroj, personoj kun la sama adreso: 30 EUR, kun reta versio de IPR: 11 EUR

c) NOVAJ MEMBROJ. Se vi ankoraŭ ne estas membro, vi povas registriĝi rete ĉe <http://instrureg.laarts.info>, aŭ bv. kontakti la kasiston Christof Krick christof.krick@esperanto.de, (poŝte Gunninghauser Str. 11a, 59955 Winterberg), Tel. 02981/899557 kaj peti aliĝilon.

d) SUBTENO: el la jara buĝeto de AGEI ni planas subvencii klerigadon kaj pluklerigadon de E-instruantoj, helpi al gejunuloj fariĝi E-instruistoj, ebligi al aktivaj gekolegoj partopreni landajn kaj internaciajn fakkunvenojn, seminariojn, konferencojn (ekz. Studsesioj en Herzberg en la klerigejo de GEA, TORPEDO, ILEI-konferenco. Bv. adresi vian peton al mi. Bv. skribi ankaŭ pri viaj ideoj, kiun alian celon por subteno vi rekomendas.

VIA FINANCA SUBTENO (krom la jarkotizo) por helpi la buĝeton estas tre bonvena!

Anticipan dankon!

e) AGEI-estraro, organiza laboro, kunsidoj:

La lasta kunsido okazis dum la Pedagogiaj Tagoj (Torpedo-2) komence de oktobro 2006. La sekvan oficialan estrarkunsidon kaj kunvenon de la membraro ni planas dum la 84a GEK en Hamburgo (25-28.05.2007 je Pentekosto). Reta aliĝilo <http://www.nigra-kato.de/GEK2007/aligilo.html> (bv. atenti la plej favoran aliĝperiodon ĝis la 31.12.2006).

En 2007 la dua kunvenblo (kun fakaj programoj, Cseh-seminario, ktp.) estos denove dum TORPED-o 3 (28.09-03.10 en Herzberg).

f) AGEI kaj ILEI: AGEI prezidantino Zsofia Korody reprezentis la landan sekcion dum la ILEI-konferenco en Parma, Italio inter 25-29 de julio, 2006. Temo de la konferenco estis "Lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj edukado por ĉiuj". La konferencon partoprenis 74 esperantistoj el 22 landoj. En la programo estis Lingva festivalo, Scienca simpozio, kunsidoj de komitato de ILEI, estrarkunsidoj de ILEI, lingvaj ekzamenoj. Mi prezentis la klerigejon de GEA en Herzberg kaj invitis ILEI-estaron kunsidi en Germanio. Tio okazis en novembro kaj laŭ ilia decido nia centro estas konsiderata ankaŭ kiel internacia pedagogia-metodika centro kaj ricevas ILEI-aŭspicion, subtenon por sia instrukapabla laboro. Fotoj: en la Fotoalbumo ĉe <http://www.ic-herzberg.de>

Post sia remembris ĉe ILEI, AGEI estas nun unu el la plej grandaj landaj sekcioj.

Ĉu ni atingos 100 membrojn en 2007??

g) INFORMADO, gazetoj, ktp.

- IPR estas je dispono por ĉiuj kunlaboremuloj, do bv. uzi tiun informkanalon kaj sendi fakajn verkojn, raportojn pri via instru-agado, ktp. <http://ilei.info/ipr/>

- ESPERANTO AKTUELL same atendas, regule akceptas instru-rilatajn artikolojn <http://www.esperanto.de/ea/>

- JUNA AMIKO: ni rekomendas al vi jarabonon (14 EUR) de tiu interesa, valora gazeto, kiu estas bona helpilo kaj por instruantoj, kaj por komencantaj kursanoj, gelernantoj:

<http://www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto/perantoj.htm>

Germana peranto: EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wiclefstr. 9, DE-10551 Berlin. Retadreso: Lu@EsperantoLand.org

La retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info/>

La retpaĝo de AGEI: <http://www.esperanto.de/agei/>

Alvokojn, rapidajn informojn, mallongajn raportojn, ktp. bv. sendi al mi por tiu ĉi cirkulero, kiu atingas ĉiujn membrojn kaj multajn simpatulojn, interesiĝantojn (ĉ. 260 homojn). (Pardonu la longan aŭtunan silenton, ĉefe pro personaj, familiaj kialoj mankis por mi redaktotempo, sed en IPR vi povis daŭre legi pri novaĵoj de AGEI en Germanio.)

II. GEC/ICH (Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg)

a) Laŭ decido de GEA-estraro la Esperanto-Centro en Herzberg fariĝis Filio de GEA por klerigado kaj kulturo. La nova ŝildo sur la domo estas videbla kun aliaj zeo-j en Herzberg, la Esperanto-urbo en la Fotoalbumo sur la retpaĝaro de ICH: <http://www.ic-herzberg.de> (kiu havas jam ankaŭ refreŝigitan germanlingvan parton).

b) PROGRAMOJ en 2007: Germana Esperanto-Centro servas E-instruadon ankaŭ dum la nova jaro ofertante lingvo-kursojn, klerigseminariojn, trejnkursojn por instruantoj, fakseminariojn pri diversaj temoj. Por la aktuala jarkalendaro bv. vizitadi la retpaĝaron <http://www.ic-herzberg.de> aŭ peti de mi en printita formo per poŝto.

2007 februaro: 2-4: 32a Studsesio: esperantologio, literaturo, kulturo

16-18: lingvokursoj (semajnfine) laŭ 3 gradoj, 19-22 (dumsemajne): kursoj kaj ekskursoj (intensa lingva ekzercado kun promenado, migrado en Herzberg kaj en la Nacia Parko Harz).

2007 marto: 06-12: Dennis Keefe: kurso pri merkatico (rekomendata al ĉiuj klubestroj, kursgvidantoj!) kaj prelegoj, seminario pri Lingvo-Festivaloj.

(Pri pli postaj programoj ni informos vin en la sekva AGEI-cirkulero.)

III. EKZAMENOJ

a) ILEI-ekzamenoj okazis dum TORPED-o 2 en oktobro. 5 kandidatoj sukcese trapasis la internacian elementan, kaj 5 kandidatoj la mezan ekzamenon. Gratulojn!

b) GEI-ekzamenoj fariĝas ĉiam pli popularaj. Post la sukcesa sesio dum PSI en St. Andreasberg en oktobro ni denove organizis ekzamenojn en Herzberg (4 ekzamenitoj en la B, meza, 5 ekzamenitoj en la C, supera niveloj). La sekva ekzamensesio estos la 31an decembro dum IS en Wewelsburg (Paderborn).

c) novaj ekzamenantoj: dum Torpedo-2 en oktobro ricevis sian ekzamenrajtigon de GEI 2 junaj gekolegoj: Sebastian Kirf, Christof Krick. Antaŭnelonge ili akiris sian E-instruistan atestilon post sukcesa fino de siaj studoj (Studsiesioj) en Herzberg.

IV. Feliĉajn festotagojn, belan Kristnaskon, sukcesojn, bondezirojn por 2007!

Kun multaj salutoj, esperante je via morala kaj financa subteno ankaŭ en la nova jaro:

Zsofia Korody
prezidanto de AGEI
zsofia.korody@esperanto.de
Grubenhagenstr. 6
37412 Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo